OFICIALA ORGANO DE ESPERANTISTA SOCIETO DE PORTO ALEGRE
JARO I-SEPTEMBRO 1947-Nº2

# SUDA STELO

NEŬTRALA MONATA NDEPENDA

## NIA SOCIETO

Post baroj, malfacilaĵoj fine venkis ni kaj malfermiĝis al ni la vojo. Jam sonas herolde la esperanta voko tra la ŝtato. Nia Societo jam havas voĉon.

Ĉu niaj celo kaj plano?

Esperantista Societo de Porto Alegre estas la nura Esperanta organizaĵo en ĉi tiu ĉefurbo. Ĝi eljetas siajn branĉojn, ampleksiĝas.

Enestas esperanta biblioteko, lecionoj de nia lingvo laŭ praktika metodo, paroligaj kunvenoj, prelegoj diverstemaj faritaj de anoj el la Societo, informoj pri la lingvo kaj movado, propagandado, kaj Unuigo de la ŝtata esperantistaro.

En nian ĵurnalon ĉiu rajtas presigi artikolon laŭkriterie de la redakcio, kondiĉe ke ĝi estu neŭtrala kaj leginda.

Ĉu niaj amikoj kaj samideanoj el la tuta ŝtato komprenas nian laboron kaj intencon?

Ĉu ili helpos al ni plifortigi la movadon, kunigante ĉiun eron en unu dikan faskon?

Oni memoru, ke ni, esperantistoj, estas idealbatalantoj, kaj ke la mondo praktikema kaj profitema rigardas nin kritike, eĉ malfide. Ofte okazas ke la malbone aŭ neinformitaj juĝas nin sencelaj kaj vanaj. Ili ne scias, ke nia voko eĥas en ĉiu loko kaj loketo de la tero, ke samideanoj el ĉiuj nacioj, lingvoj, religioj sinreciproke interkomprenigas kaj estimas, dank' al la mirinda forto kunfratiga de Esperanto.

Kaj ĉiu esperantisto sentas sin hejme, ĉar li apartenas al la Esperantista Popolo de l' ampleksa Esperantujo.

Sciencistoj, fakuloj kaj beletristoj venas al ni; multaj fakaj vortaroj publikiĝis; nia lingvo jam estas riĉa, nuancesprima kaj provita. La mondo vere jam havas internacian lingvon, kies konstato estas al ĉiu tre facile kaj alirebla.

Unu fojon konsciiĝinte pri tia koloso organizaĵo, oni ne povas plu forlasi ĝin. Tion ni faros.

Jen nia celo.

--- oOo ---

FRANK SINATRA

Kontraŭe al tio, kion multaj pensas, ne estas pro mensa streĉo kaŭze de la milito dum tiu periodo - en foresto de karaj personoj kaj neeerteco pri ilia reveno - sed pro la profunda poezia sento aŭ esprimo de la belo elmontrita laŭ facile alirebla maniero, ke atingis la kanzonoj de Sinatra tion vastan sukceson kaj popularecon.

Liaj mildaj melodioj, plenaj je dolĉa kaj trankvila muzikesprimo, kreas medion al la sona elparolado en poeziaj simplaj frazoj, kiuj parolas pri sentimentalaj momentoj per emociiga ekstazo.

Estas faktoj de ĉiuj konataj kaj vivitaj sed prezentitaj laŭ originala kaj populara maniero, tamen ne vulgara: enestas propra stilo.

La moderna versaĵo, kies poezio troviĝas ne en la formo, sed en la penso, levigas la okazaĵojn al la spirita ordo, nobligante ilin.

Tiu virto de la poezio stimuli altajn pensojn kaj spiritiĝi la personojn, estas malkaŝita al la komunaj personoj per la simpleco kaj naiveco.

Sia ripoziga karaktero rememorigas iamaniere la sonajn kombinaĵojn de la muziko de Debussy, kiuj pleniĝas la animon de bela paco el kiu oni ekvidas radiantan senfinon.

La muziko de Frank Sinatra estas bela fonto por kulturo kaj emocia intelekta disvolviĝo. Estas ponto kiu ligas la laikon al la artecaj esprimojn pli alta sfero.

Boris Eston

---

HOMAĜO

ALOIS FURTENBACH

Nia neforgesinda amiko, s-ano Alois Furtenbach , estinta kasisto de ESPA, estas ĉiam inter ni rememorata kun bedaŭro pri lia foresto.

En malproksiman urbon li transloĝiĝis, tial ni ne plu povis vidi lin ĉe niaj kunvenoj, kaj tuŝiĝi de lia entuziasmo kaj fido al nia laboro.

Tre lerta kasisto li ĉiam estis kaj senlace atentadis pri la Societa kaso kaj ties enspezo.

Ni venkos, ĉar ni laboras por komuna bono kaj paco, li diradis. Vere, nia ideologia similas la fenikson de la legendo, kiu post bruligita renaskas el siaj cindroj. Same ni refaras niajn pro milito estingitajn societojn. Nia samideano estis prava.

Kiel desegnisto li tre multe helpis al ni: li pentris per nigraj literoj la titolon sur societaj libroj, li faris grandan stelon kun grandaj literoj por fotografado de la grupo, desegnis belan propagandan ŝtampilon ĝis nun ne uzitan kaj aliaj. Danke, s-ano Furtenbach, ni tre dankas vin.

ŜERCAĴOJ

La ŝercemulo praktikadas

Populara komediisto kaj bona ŝercisto iam cinike alparolis nekonaton surstrate kun la demando:

- Pardonu min, sinjoro, sed ĉu vi perdis unu dolaron? kaj li tenadis la moneron per la dikfingro kaj la montra.

La viro faris surprizan mienon, rigardante la moneron, kaj tuj post traserĉo ĉe si, li diris:

- Jes, vere ĝi elsaltis el mia poŝo nerimarkite.

La komediisto skribis en sian notlibreton la nomon kaj adreson de la persono, kaj metinte la monon en sian poŝon, deiris.

- Bone! diris la perdinto, ĉu vi deziras ĝin tutan kiel rekompencon?

- Ho! mi ne trovis iun, rediris tiu, sed venis al mi en la kapo, ke en granda urbo kiel ĉi tiu, nepre estas grandnombro da perdita mono, kaj post esploro mi konstatis, ke vi estas la tridek-unua persono, kiu perdis unu dolaron em hodiaŭa mateno.

---

Scivolemo

Nikoĉjo senĉese demandadas pri ĉio.

- Estas pli bone, ke vi silentu, aŭ io malbona povas okazi al vi, diris foje lia lacigita patrino. "Scivolo iam mortigis katon" (Proverbo).

La knabeto impresita, silentis dum tri minutoj, kaj poste:

- Diru al mi, panjo, kion volis scii la kato?

---

Eĉ la bovo sciis

Metropola knabino ĝuante sian libertempon ĉe la kamparo , plendis al la farmisto pri la sovaĝa maniero laŭ kiu la bovo rigardis ŝin.

- Bone, diris la viro, ĝi certe okazas pro tiu ruĝa bluzo, kiun vi uzas.

- Dio mia, ekkriis la knabino, nature mi scias ke ĝi estas tre malmoda, sed mi eĉ ne konjektis, ke kampara bovo povus ĝin rimarki.

SUDA STELO
Oficiala Organo de "ESPERANTISTA SOCIETO DE PORTO ALEGRE"
Neŭtrala Monata Sendependa

JARO I—SEPTEMBRO 1947— Nº 2

DIREKTORINO: (Diretora)
F-ino Cleoy Zamora
RESPONDA REDAKTORO; (Redator Responsável)
S-ro Boris Eston

REDAKTEJO: (Redação)
São Carlos, 1192
Pôrto Alegre — R.G.S.
Brasil

Poŝkesto (C. Postal) Nº 1415

JARABONO (Assinatura anual)
Cr$ 20,00 aŭ
Usona Dolaro $1.00

EKZEMPLERO (Número Avulso)
Cr$ 2,00

"ESPERANTISTA SOCIETO DE PORTO ALEGRE" kunvenas ĉiusabate, je la 20ª horo en la "Curso Gosch", ĉe strato Andradas.

A "ESPERANTISTA SOCIETO DE PORTO ALEGRE" reune-se todos os sábados às 20 horas, na rua Andradas — Curso Gosch — 1º andar.

ONI PETAS INTERŜANĜON


PEDE-SE PERMUTA

PENSO

Ne la marĝ partdividas la popolojn, sed ilia mal klereco. (Ruskin)

---

KRUCVORTENIGMO



HORIZONTALAJ

1 — Ĉia kvanto
5 — Tranĉa aŭ pika
9 — Imaga abstrakta koncepto
10 — En kiu tempo?
11 — Kreado (inversa)
12 — Speco de fiŝo
13 — De la verbo moki
14 — Verbo ami
15 — Preskaŭ pugno lukti
19 — Speco de sovaĝa porko
20 — En kia maniero
21 — Nedifinita kvanto (adjektivo)
22 — Granda en vertikala direkto
26 — Havanta egalan aspekton, econ
30 — Pro kia kaŭzo?
31 — De la verbo ami
32 — Je l honora parolo
33 — Speco de korko por kapti fiŝojn
34 — Leviĝo kaj malleviĝo sur la suprajo de akvamaro
35 — Ludkartoj

VERTIKALAJ

1 — Ĉia nombro
2 — Imago abstrakta koncepto
3 — Kreado (inversa)
4 — De la verbo moki
5 — Tranĉa aŭ pika
6 — En kiu tempo?
7 — Speco de nombroforma fiŝo
8 — Kore ŝatos iun
15 — Kuiri en forno
16 — Narkotaĵo
17 — Tago de la semajno
18 — Ne akompanata, izola
22 — La fluido de riveroj, maro
23 — Preskaŭ granda mola kaj spongeca glando
24 — Preskaŭ metala fadeno (inversa)
25 — Vojo ombrita per arboj

(daŭrigota sur paĝo )

# SUDA STELO

ÓRGÃO OFICIAL DE "ESPERANTISTA SOCIETO DE PORTO ALEGRE"

MENSÁRIO NEUTRO E INDEPENDENTE

ANO I SETEMBRO DE 1947 Nº 2


## SUDA MOVADO

"ESPERANTISTA SOCIETO DE PELOTAS"

Je la 24ª de Aŭgusto 1947ª, sekve de senlaca kaj sukcesplena propagando de samideano Helmuth Schenk, fondiĝis en urbo Pelotas nova organizaĵo por la propagando de disvastigo de la internacia lingvo, "ESPERANTISTA SOCIETO DE PELOTAS" situas ĉe stratangulo Benjamim Constant-15 de Novembro en spiritisma centro.

La societo estas neŭtrala, pro tio ĝia estraro intencas kunveni en aparta salono, kiu estas taŭga por la difinita celo.

Al la nova Societo ni kore sendas niajn salutojn!

XI BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

La propaganda Delegito kune kun ESPA bone diskoniĝis informojn pri la XI BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO, okazonta en S.PAULO, de la 13ª ĝis la 21ª de Septembro kuranta. Oni dissendis informon kaj peton por kunhelpo al la 70 ĵurnaloj de ŝtato Rio Grande do Sul, kaj preskaŭ ĉiuj aperigis artikolojn pri ĝi; al la radistacioj de Porto Alegre kaj Pelotas; en la montrafenestrojn de la ĉefurbaj komercejoj, ktp..

---

Tre talenta artpentristo el Rio Grande (urbo) faris olean portreton de D-ro Zamenhof, kiu estas vera majstroverko. ESPA sendos la verkon al la kongresejo. La pentristo nomiĝas Ewerton Medeiros, kaj ni estas fieraj ke tia granda majstro ni helpas per lia senmezura talento.

(daŭrigo de paĝ 3)

26 - Normala funkciado de ĉiuj organoj de la korpo
27 - Karo ŝatas iun aŭ ion
28 - Malgranda rodulo
29 - Ludkartoj

Vortaro: Bonsona Metodo

Ni oferas al niaj legantoj ĉi tiu interesoga krucvortenigmo farita de nia samideano D-ro Barros. La solvoj devos esti senditaj al nia redaktejo kaj la nomoj de la solvantoj estos publikataj okaze.

## NOVA DIRETORIA DA ESPA

Realizou-se no dia 23 de Agosto p.passado a eleição para nova Diretoria da ESPA, que dirigirá os destinos da Sociedade, no período 1947-1948.

Após a apuração, verificou-se terem sido eleitos os seguintes membros:

PRESIDENTE:
Cel. Wanderley F. Gonçalves

VICE-PRESIDENTE:
Dr. Ernani Corrêa

SECRETÁRIO GERAL:
Sr. Boris Eston

TESOUREIRO:
Dr. José Corrêa de Barros

BIBLIOTECÁRIO:
Sr. Rubens Xavier

Em vista de não estarem presentes alguns membros, a posse da nova Diretoria só foi feita no sábado seguinte, dia 30 de Agosto, ocasião em que o Sr. Ary Zamora, em rápidas palavras, empossou a Diretoria eleita. Após, o Cel. Wanderley Gonçalves agradeceu a distinção de que havia sido alvo, prometendo tudo fazer pelo progresso da Sociedade.

SUDA STELO tem a grata satisfação de cumprimentar a nova Diretoria, augurando-lhe ao mesmo tempo, uma série ininterrupta de grandes realizações para a ESPA.

## PUBLICAÇÕES RECEBIDAS

Recebemos e agradecemos as seguintes publicações:

NOVA SENTO

O BRASIL ESPERANTISTA

RIO ESPERANTISTA

SEM O SEU AUXÍLIO "SUDA STELO" NÃO PODERÁ VIVER. TORNE-SE SEU ASSINANTE!